

Je la nomo de Dio

Pajam-e

# *Sabzandiŝan*

(Mesaĝo de Verdpensuloj)


Kultura sezon-revuo en E-o kaj la persa

**Respondeca direktorino :**

*Fariba N.Maĝd*

**Ĉefredaktoro :**

*M.Reza Torabi*



**Kovrilo: Ŝahram Hasanzade**

**Eldonaj aferoj kaj abonantaro :**

*Reza Haĝihasanlu*

**Adresoj :**

P.O.Kesto 17765-184,  
Tehran, Iran

**Telefono :** (0098 21) 7437138

**Fakso :** (009821) 7463812

**TTT-ejo :** [www.sabzandishan.com](http://www.sabzandishan.com)

**Retpoŝto:** [info@sabzandishan.com](mailto:info@sabzandishan.com)

## Enhavo

<b>Noto de respondeca redaktoro</b> .....	<b>paĝo 2</b>
<b>Mesaĝo de UEA prezidanto</b> .....	<b>paĝo 3</b>
<b>Sinprezento de d-ro Sayadpour</b> .....	<b>paĝo 4</b>
<b>Psikologie</b> .....	<b>paĝo 5</b>
<b>Vojaĝ-raporto</b> .....	<b>paĝo 6</b>
<b>Nova proverbaro</b> .....	<b>paĝo 8</b>
<b>Iranaj vidindaĵoj</b> .....	<b>paĝo 9</b>
<b>Irana kulturo</b> .....	<b>paĝo 14</b>

## Persa parto :

<b>Redaktora noto</b> .....	<b>paĝo 27</b>
<b>Mesaĝo de UEA prezidanto</b> .....	<b>paĝo 26</b>
<b>Historio de E-o en Irano</b> .....	<b>paĝo 24</b>
<b>Praga manifesto</b> .....	<b>paĝo 22</b>
<b>Kio ni estas kaj kion ni celas</b> .....	<b>paĝo 21</b>
<b>Esperanto-literaturo</b> .....	<b>paĝo 18</b>
<b>Irana kulturo</b> .....	<b>paĝo 15</b>

Bonvenas eseoj, artikoloj, raportoj kaj kontribuaĵoj kondiĉe ke ili ne estu aperintaj ie ajn .

Bonvenas kultur-temaj kontribuaĵoj.

Ni aperigas kaj Perse kaj E-e nur unua foje prezentitaĵojn.



Feliĉe post longa atendado nia plantita semo ĝermis.

Mi devas mencii ke en Irano publikigi revuon havas longe daŭrajn procedorojn kaj ni post preskaŭ 5 jaroj finfine sukcesis akiri permesilon por eldoni nian revuon kiu estas unika kaj en Irano kaj en mez-oriento !

Post preni leĝan permesilon kaj trapasi leĝajn fazojn , jen estas en viaj manoj klopodoj de niaj geamikoj: du lingva sezon-revuo.

Nun estas je la komenco de nova fazo en Irana esperanta movado, kiu fakte estas nova etoso. Fakte laŭ mi komenco de ĉi tiu revuo estas ĝermo kiu per nia klopodo altiĝos, fortiĝos kaj ....

Mi esperas plenbenan komencon al ĉiuj geesperantistoj speciale geesperantistoj en Irano. Vere en Irana Esperanto movado estis bezonata esperanta revuo kaj ni ĉiam sentis ĝian mankon ĉar tiu povus fortigi rilatojn inter ĉiuj geesperantistoj enlande kaj eksterlande.

Ni scias en la revuo estas mankoj diversforme sed ni esperas helpe de niaj estimataj geamikoj plibonigi kaj ke la revuo trovu sian logikan lokon en la publika sceno. Ni estas je komenco de la vojo , do, bonvolu helpi nin kaj speguli al ni , viajn vidpunktojn kaj ideojn. Mi dankas al ĉiuj karaj geamikoj kiuj eksciante pri la aperigo de la revuo el diversaj landoj afable plikuraĝigis kaj entuziasmigis nin sendante mesaĝojn tra la reto kaj poŝto.

Salutas ;

Fariba N. Mağd

## زبان اسپرانتو را با مکاتبه بیاموزید!

برای کسب اطلاعات بیشتر و دریافت بروشور رایگان دربارهٔ زبان اسپرانتو و دوره‌های آموزش مکاتبه‌ای آن با ما تماس بگیرید:

سبزاندیشان  
(شماره ثبت 9085)

کانون پژوهش و کاربرد زبان بین‌المللی اسپرانتو

تهران ، صندوق پستی 17765-184 ، فکس: 7463812

## Esperanto: lingvo por dialogo inter civilizoj

**L**a nomo de via revuo estas bone elpensita el pluraj vidpunktoj. La simboleco de la verda koloro estas grava por pluraj hom-grupoj, kiuj do volos rekoni sin en ĝi.

Por esperantistoj la verdo estas la koloro de espero. Espero, kiun estis esprimita, ekzemple, en la unuaj kongresaj paroladoj: "Longe daŭros ankoraŭ malluma nokto sur la tero, sed ne eterne ĝi daŭros. Venos iam la tempo, kiam la homoj ĉesos esti lupoj unu kontraŭ aliaj..."

Preskaŭ unu jarcento pasis de tiam, jarcento plena je la plej teruraj teruraĵoj, kiujn certe oni ne povis tiam imagi, jarcento plena je teruraĵoj plenumitaj ne de popoloj postrestintaj kaj vivantaj en profundaj ĝangaloj sed de homoj laŭ komuna sento plej civilizitaj.

Ankoraŭ hodiaŭ se vi legus la verson "Popolo popolon atakas kruele", vi povus kredi, ke ĝi estis ĵus verkita por priskribi okazaĵon de ĉi tiuj tagoj. Sed eĉ io pli malbela okazas, laŭ mia kompreno, ĉar malgraŭ la paso de unu jarcento la proponantoj de perforta solvo de ĉio solvinda, la proponantoj de la "leĝo de la ĝangalo", nun kiel tiam ne hontas pri si mem. Ili eĉ fiere anoncas, ke ili estas la avangardo de progreso kaj tutmondiĝo, kaj ke estas nature ke fortuloj kaj efikuloj regu kaj aliaj regatu. Sed Esperanto ne estis kreita por tio. Esperanto estis kreita por ke dialogo inter grupoj, popoloj, landoj kaj finfine civilizoj ekestu sur neŭtrala, egaleca bazo.

Esperanto ekzistas ĝuste por tio, por ke "neniu humiliĝu", laŭ alia esprimo de fruaj paroladoj, en la rilatoj kun eksterlandanoj. En tiu senco oni povas diri ke la dialogo intercivilitoj estis petata de esperantistoj antaŭ tre longa tempo, multe pli frue ol la irana ŝtat-prezidanto lanĉis ĝin en la nunaj tempoj.

Tio estas esence la kialo, pro kiu Universala Esperanto-Asocio decidis nun lanĉi la kampanjon "Lingvaj Homaj Rajtoj". Ĝi volas esti ampleksa informkapanjo, kiu ree proponu la uzon de la internacia lingvo Esperanto kiel ilo de justeco, eventuale ankaŭ sed ne nur kiel ilo de efikeco.

Vi scias, ke kelkaj neesperantistoj, kiel Tove Skutnabb-Kangas kaj Robert Phillipson, kaj aliaj ĉirkaŭ ili provas lanĉi la koncepton pri Lingvaj Homaj Rajtoj. Ni, kies pioniroj inventis tiun koncepton antaŭ ol la koncepto mem pri Homaj Rajtoj naskiĝis, provu ligi Esperanton al ĝi en la menso de la homoj. Esence la celo estas, ke post iom da tempo, kiam oni aŭdos la vorton Esperanton, oni aŭtomate pensos: "Aĥ, jen ree tiuj, kiuj okupiĝas pri lingvaj homaj rajtoj kaj pri dialogo inter civilizoj!"

La kampanjo "Lingvaj Homaj Rajtoj" konsistu konsistu el pluraj kunordigitaj agadoj (kaj la listo estas nur komenca listo):

- \*a - provo atingi, ke UN diskutu la NRO-rezolucion de Seulo, kiu petas, ke oni (la Socia kaj Ekonomia konsilantaro de UN) serioze pristudu la problemon de internacia help-lingvo.
- \* b - la agado "lingvo de paco kaj dialogo" kadre de la Jardeko por kulturo de paco 2001- 2010 de Unesko kaj UN, kies oficiala partnero UEA estas. ĝi esence baziĝus simple sur ofertado de retaj Esperanto-kursoj al NRO-oj kaj al individuoj, ĉefe en militaj teritorioj, sub la ŝildo de tiu Unesko-kampanjo, kaj sur aliaj iniciatoj kiuj provos ekstege dialogon inter malsamaj civilizoj.
- \* c - "lingvaj homaj rajtoj" estas la koro de la inform-kampanjo al intelektuloj, ĵurnalistoj, politikistoj, normala publiko. Ĝi devus konsisti el informpakaĵo, kunmetita de ni kaj vaste donacata tra la mondo, kaj el anoncoj en gazetoj. La celo de la anoncoj, kompreneble, estus la lingvaj homaj rajtoj, sed per la fina adreso oni kunligus ilin al Esperanto kaj al Esperantujo.

Kial mi havis jam okazon diri aliloke, persone mi estas nur profeto sen armiloj kaj UEA povas fari nur tion, kion vi faros en ĝia nomo. Por efektiviĝi ĉi tiun programon ni bezonas vin ĉiujn, iranajn kaj alilandajn esperantistojn.

Ni bezonas tiujn, kiuj estas konvinkitaj ke Esperanto estas elemento de justeco en la rilatoj inter la unuopaj civilizoj kaj landoj, kaj ke ne ekzistas plifortuloj, kiuj rajtas uzi sian lingvon, kaj malplifortuloj, kiuj ne rajtas, ke ekzistas kulturoj, kiuj indas esti transdonataj al la aliaj homoj, kaj kulturoj, kiuj simple formortu hejme. Neniam kiel nun la mondo bezonis Esperanton, eĉ se ĝi ne agnoskas tion.

*Unu el miaj celoj estas prezenti Iranajn geesperantistojn kiuj sia vice aktivadis pri Esperanto ĉu private ĉu organizite. Manko de komunikiloj malpermesis Irana esperantistaro konatiĝu kun siaj favoruloj kaj talentuloj. Ni alvokis tiujn kiujn ni jam konis por kontribui en la revuo kaj sinprezenti. Jen la unua sinprezentanto kies kontribuado estas sekvata. (La red.)*



**E**n 1967 mi naskiĝis en edukita familio.

Mia patro tiam estis ĝenerala kuracisto kaj poste fariĝis kirurgo kaj universitata profesoro. Mia patrino estis akuŝistino kaj universitata instruistino. Mia patro ankoraŭ laboras sed mia patrino emeritiĝis. Mi naskiĝis en religia urbo plejmulton da mia vivo. Mia ununura fratino naskiĝis 5 jarojn post mi. Ŝi estas kuracistino kaj nun studas patologion en Tehrano. En 1985 mi gajnis la unuanrangon inter la partoprenintoj de la tutlanda universitatenira ekzameno en la sekcio de medicinaj fakoj. Mi studis ĝeneralan medicinon en Mashad kaj diplomiĝis en 1992. Post militservo kaj la servo en foraj regionoj, mi akceptigis por specialista kurso pri pediatrio (infanmedicino) kaj diplomiĝis en 2000.

Ekde tiam mi laboras en Urbeto Esfarayen, 300 Km-ojn okcidente de Mashad. Lastjare mi edziĝis kun d-ino Mahsan Seyfoddin, iama samklasano de mia fratino. Ĉi-jare mi sukcesis en la ekzameno por eniri subspecialistan kurson pri pediatria kardiologio (infanaj kormalsanoj). La kurso komenciĝos ĉi-septembre kaj mi restos 3 jarojn en Tehrano por tio.

Mi eklernis E-on en 1985. Tiam mi partoprenis en la tutlanda universitatenira ekzameno kaj por la unua fojo dum mia vivo, mi regule aĉetis ĵurnalon por la novaĵoj rilataj al la ekzameno. Mi hazarde vidis anoncon de Omid Kultura Asocio pri la lingvo kaj aĉetante lernolibron de tie mi eklernis la lingvon ĝuste dum tiu monato en kiu mi komencis lerni medicinon! Dum la pasintaj jaroj mi agadis rilate al nia lingvo diversflanke. Urbe mi kunorganizis kaj partoprenis regulajn kaj neregulajn kunsidojn de miajsamurbaj e-istoj. Mi kunorganizis universitatan librekspozicion kaj turisman programon. Lande mi havis firmajn rilatojn kun iranaj aktivaj organizaĵoj kiel IREJO kaj Sabzandiŝan Instituto (Irana Esperanto-Centro). Globe mi estis komitatano de TEJO dum du periodoj. Mi partoprenis en IJK-1996 en Germanio. Mi ankaŭ verkis kelkajn artikolojn por e-aj periodaĵoj. Miaj artikoloj aperis en Monato, Revuo Esperanto, Medicina Internacia Revuo, Medicina Heroldo, Literatura Foiro kaj Juna Amiko. Mi estas membro de UEA, UMEA, Pasporta Servo, Amikeca Reto kaj ITRE. Mi estas fakdelegito de UEA kaj Landa Delegito de UMEA. Kiel multaj e-istoj, mi alvenis al mia mezaĝa breĉo de mia e-agado dum pasintaj jaroj. Do deve miaj e-aktivadoj malmultiĝis. Sed mia inklino al E-o kaj interna energio por e-umi ne elĉerpiĝis kaj mi ĉiam serĉas oportunojn por ĝui tiun lingvon!

## Forlasu Inklinon al la "Konatoj"

*D-ro Keyhan Sayadpour*

En nia mondo, oni povas dividi la homojn laŭ ilia imuneco al du grupoj. La unuan konsistigas tiuj kiuj posedas eksteran imunecan. Ili apogas al garantiadoj kiel mono, banka konto, domo, aŭto, posteno kaj pli grave al la konatoj. Ili pensas ke oni povas garanti la imunecan per la konatoj, sed ili eraras ĉar tia imuneco estas efemera. Ili preterpasas nekonatojn kaj ne ŝatas novajn eksperimentojn; ili konstante faras jam faritajn agojn! La inklino al la konatoj malliberigas ilin en la pasinteco. Tiuj personoj ne vivas 365 tagojn ĉiu jare sed ili ripetas unu tagon 365-foje ĉiu jare!

La anoj de la dua grupo posedas malsimilan formon de imuneco. Ili ĉiam fidis al si mem kaj apogas al siaj internaj fortoj. Tiuj personoj ne timas de nekonatoj ĉar la tereno de nekonatoj enhavas multe da novaj eblecoj kiuj povas sukcesigi ilin.

Kelkaj signoj de la personoj kun ekstera imuneco kies timoj de noveco baras ilian sukceson estas jenaj:

Ili neniam iras al restoracioj neklasikaj kiel la ĉinaj, japanaj kaj eĉ tradiciaj, ĉar ili pensas ke tieaj manĝaĵoj ne estas gustumblaj kaj eĉ povas esti danĝeraj.

Ili ĉiam legas unu aŭ kelkajn certajn gazetojn aŭ ĵurnalojn,

kiuj apartenas al iu politika grupo kaj neniam legas periodaĵojn de la rivalaj politikaj grupoj.

Ĉiam ili loĝas en la sama urbo aŭ eĉ unu kvartalo ĉar iliaj gepatroj ankaŭ loĝis aŭ loĝas tie. Ili timas ŝanĝi la loĝlokon.

Ili ĉiam ferias en la sama regiono kaj eĉ en la sama hotelo kaj ne riskas vojaĝi aliloke kaj do perdas multajn ŝancojn.

Ili ĉiam havas la saman okupon eĉ se tio ne plaĉas al ili kaj eĉ se ili ne havas ŝancon de progreso en tiu okupo. Ili timas de novaj okupoj.

Ili valorigas personojn, sukcesojn kaj ĉiujn aliajn nur laŭ mono kaj ne havas alian valormezurilon.

Ili malofte parolas al fremdaj personoj. Ili pensas ke aliaj estas pli saĝaj aŭ pli ruzaj ol ili, do ili rifuzas novan interrilaton. Ili ofte havas malmulte da amikoj.

Ili faras ĉion laŭ difinita horaro. Ili ĉiam portas brakhorloĝon eĉ dum la dormo. Ili manĝas laŭ la horo kaj ne laŭ la apetito!

Ili ne uzas avantaĝojn en la vivo ĉar ili timas perdi vivo-vojon dum la ŝanĝoj.

Kaj kompreneble ili rare akceptos lerni Esperanton eĉ se vi multe parolos pri la lingvo al ili. Do ne perdu vian tempon instigi tiajn personojn al Esperanto!

## Iomete pri la vojaĝo al Irano

در سال های اخیر، تعداد اسپرانتیست‌هایی که از ایران دیدار می‌کنند همواره رو به فزونی بوده است. در فروردین ماه 1380، خانم آن لوئیز از کشور سوئد، دیداری 15 روزه از ایران داشت. در این گزارش سفر، که خلاصه شده نیز می‌باشد، او به توصیف مشاهدات خود از ایران می‌پردازد و اینکه قبل از سفر به ایران همه دوستان و آشنایانش او را از رفتن به ایران بر حذر می‌داشتند(!؟) اما، او پس از پایان سفر آرزو می‌کند که دوباره به ایران برگردد و امیدوار است که این بار زبان فارسی اش را نیز کامل کند!

با توجه به اینکه فرهنگ ایرانی، نه همه آن چیزی است که از تریبون های رسمی القا می‌شود، گزارش سفر کسانی مانند آن لوئیز می‌تواند آینه‌ای باشد برای منعکس کردن واقعیت های ایران امروز و این دیدارها می‌تواند آغازی شایسته برای گفتگوی فرهنگ‌ها باشد.

**I**rano tre bone impresis nin. Peter antaŭ la forveturo estis iomete maltrankvila, ĉar kiam li antaŭ dek jaroj laste vizitis la landon li spertis kelkajn malfacilaĵojn. Li estas ja sveda civitano kaj ankaŭ ĉi-foje devis multe klopodi por ricevi vizon, sed kiam ni jam estis veninta en Irano ĉio iris glate. La pasportoj kaj vizoj estis en ordo, kaj la (virinaj) doganistoj nur formale demandis ĉu ni havas ion doganpagendan. Ene en la lando ni veturis per aŭto aŭ per aŭtobuso. En la urboj la aŭtobusoj estas dividitaj, la virinoj devas veturi en la malantaŭa parto, sed en la interurbaj busoj la seksoj intermiksas. Tamen oni ne rajtas sidi apud nekonata persono de la alia sekso.

Jam en la flughaveno de Tehrano oni atendis nin. Ni loĝis tri noktojn en Tehrano. Poste ni iris al Ghom kaj Kashan. Post tio ni pasigis unu semajnon Kermanshah.

Post Kermanshah ni vizitis Khorramabad urbon kaj de tie ni iris al Esfahan, kiu ja estas fama urbo. Nur tie ni vidis turistojn, kiuj ne tute obeis la regulojn pri vestaĵoj. Jam en la flughaveno de Kopenhago, kiam ni eniris la aviadilon, la virinoj devis surpreni kaptukon (ĉar ni veturis per irana aviadilo). Krom kaptukon estas

devige surhavi longan jupon aŭ pantalonon kaj mantelon aŭ jakon kun longaj manikoj. Ankaŭ viroj devas surhavi longajn pantalonojn, verŝajne ankaŭ longajn manikojn. Tamen homoj ne tute obeas la regulojn. Mi pensas ke ili protestas streĉante la limojn. Multaj viroj havis T-ĉemizojn aŭ "pikeo"-ĉemisoj, kaj multaj virinoj, precipe en Tehrano, paŝis kun nudaj piedfingroj en sandaloj (!!)

Tion mi ne povis antaŭe imagi. Mi kunportis nur sentruajn nigrajn ŝuojn kaj nigrajn ŝtrumpojn.

Ĉar ni veturis kiam ankoraŭ estis printempo, la vetero estis bonega, suna sed ne tro varma. La noktoj eĉ estis tro malvarmaj, fakte tiu aliflanke ĝi donis al ni bonan dormon. La naturo estis bonkreska kun multaj floroj. En Kermanshah kaj Khorramabad, kiuj estas ĉirkaŭitaj per montoj, akvo fluis en la stratkanaletoj sed en Esfahan bedaŭrinde la rivero estis tute seka. Oni parolis pri manko de akvo dum la lastaj jaroj.

Kermanshah situas ĉe la periferio de la kurda teritorio. Oni povas en la urbo vidi virojn en siaj tipaj vestaĵoj. Ili kutime surhavas mallongan jakon kaj tre larĝan pantalonon. Tiu lasta ĉar ili loĝas en la montaro kaj piediras supren kaj malsupren laŭ krutaj

deklivoj. Ni ankaŭ kune kun malnova amiko de Peter, kiu parolas la kurdan, faris ekskurson al la urbo Javanrud proksime al la iraka landlimo. La lastan semajnon ni pasigis en Tehrano kaj en la Nordo, la Kaspia regiono. Ni loĝis ĉe la fratino de Peter, kiu kune kun sia edzo konstruis malgrandan domon en la kamparo 25 kilometroj sude de la urbo Rasht. Iliaj najbaroj estas kamparanoj kiuj bredas kokinojn, anserojn, meleagrojn, bovojn, kaj kultivas rizon. La kortospacoj de la najbaroj preskaŭ plenplenis je la plej ravaj idaroj, la kokoj kaj la virmeleagro tre fiere paŝis kaj levis siajn plumojn, kaj malgranda bovido kun "granda" voĉo vokis sian patrinon, kiu paŝtis sin en la densa verdaĵo rande de la rizkampoj. Estis preskaŭ paradiza loko.

La Nordo estas apartigita de cetera Irano per la grandega montoĉeno Albors (Elburz), sur kies suda deklivo situas Tehrano. La nuboj malofte sukcesas transiri la montojn sed lasas la pluvon norde de la montoj. Tial la Nordo estas tre verda (kaj tre humida). La pintoj estas neĝkovritaj, kelkaj eĉ dum somero. Bedaŭrinde Tehrano ege suferas de malpura aero kaj oni malofte povas ĝui la vidon de la neĝkovritaj montoj tuj malantaŭ la grandaj, elegantaj domoj de norda Tehrano.

Ĉiuj homoj, konatuloj, najbaroj, taksioŝoforoj, homoj en la strato, estis tre afablaj. Ni spertis neniun problemon kaj tuj decidis reveni post kelkaj jaroj. Tamen, speco de problemo mi spertas nun, reveninte hejmen, ĉar mi ne povas fari prelegon

kun lumbildoj. La vojaĝo estis por tio tro privata. Mi ne vizitis la vidindaĵojn kaj turistajn lokojn, kiujn oni "devas" viziti, kaj mi hezitis uzi mian fotilon en la stratoj por ne ofendi aŭ maltrankviligi homojn. Eble mi eraris en tiu afero, sed tamen mi havas la (neregistritajn) bildojn en mia memoro.

Multaj homoj diris al mi ke Irano estas tre stranga lando, ĉu vere mi ne timas iri tien? Fakte mi tute ne trovis la landon stranga. Kiel en aliaj landoj oni devas nur observi kaj lerni kiamaniere konduti. Mi vojaĝis en multaj diversaj landoj kaj la iran kulturon mi renkontis dum 25 jaroj kaj en Svedio kaj en aliaj landoj, kie ni vizitis iranajn familiojn. Mi jam antaŭ multaj jaroj klopodis studi la iran sed mia laboro lasis al mi malmulte da tempo kaj poste Esperanto tute forviŝis ĉiun alian intereson aŭ hobion. Sed nun mi decidis ke kiam ni venontan fojon iros al Irano mi devas scii la lingvon.

*Ann-Louise - Svedio*

Foto: En Ĝavanrud kun kurda junulo



# Nova Proverbaro

*Morteza Mirbaqian*

**Fiŝo bezonas maron, lupo bezonas arbaron, tigro bezonas montaron, homo bezonas najbaron.**

**Kiu mem havas makulojn, ne prijuĝu aliulojn.**

**La vivo similas al la milito, nenion gajnas dormantoj sur lito.**

**Serĉanto de la scio kaj riĉo, ne volas audi pri vorto "sufiĉo".**

**Se vi deziras pacon kun najbaro, ne scivolemu pri lia faro.**

**Arbo de l' vivo neniam verdiĝas, se 'Hodiaŭo' daŭre perdiĝas.**

**Grandajn murdistojn oni nomas; "lia moŝta reĝo", sed al etajn oni punas sur la elektra seĝo.**

**"Eble" kaj "Se" : fratoj de "Ve".**

**Hundo kiu lupojn ignoras, kun la lupoj kunlaboras.**

**Oni antaŭ la komenco, pensu pri konsekvenco.**

**Homo kiu sinceras, ĉies koron konkeras.**

**por ne perdi bonulon, ne forgesu kalkulon.**

**Oro parolas silente, tamen plej elokvente.**

**Kiu optimisme pensas, pli facile sukcesas.**

**Kiu nur al unu celo pafas, pli malpli frue ektrafas.**

**Nur la homo kiu plej bonas, malgraŭ venĝ-povo pardonas.**

**En venĝo estas malbono, bono kuŝas en pardono.**

**La sinjorina peto, egalas al dekreto.**

**Konu homon laŭ koro, laboriston laŭ laboro.**

**Formiko kiu ne ŝparas somere, dum vintro devas vivi mizere.**

**Por ke ne regu nin tirano, oni ne estu lia mano.**

**En rapida kuro, mankas daŭro.**



## Zigurat-e-Ĉogazanbil

Raana Abedian

"Zigurat", vorte signifas supreniri al la ekstremo de la ĉielo, kio estas la fina ideo de la homo: atingi ĉielon.

"Ĉoga" signifas monteton hom-faritan laŭ la loka dialekto- kaj "Zanbil" estas korbo, ĉar la formo de Zigurat(=preĝejo) aspektas inversigitan korbon. La grandega preĝejo "Zigurat-e-Ĉogazanbil" estas kulturaĵo de la homaro kiu enlistiĝis per Unesko en la jaro 1979 kiel kultur-heredaĵo de la mondo.

La antikva urbo Ĉogazanbil situas en la 40 km de la sudoriento de Suzo kaj 120 km de la nordo de Ahvaz urbo (La centro de la Ĥuzestan provinco en Irano).

Ĉi-preĝejo estas la plej granda monumento de Ilamana imperio, loĝinte en nuna Ĥuzestan, en la unuaj jaroj de la 13a jarcento (a.k). Civitaj inĝenieroj komisiigis konstrui relegian urbon nomita "Duruntash" je  $1300 \times 1000 \text{ m}^2$  vasta, kies nomo poste ŝanĝiĝis al "Ĉogazanbil".

Ĉi-tiu urbo jam konsistis el tri interligitaj muregoj. La ĉefa pordego situas en granda murego en orienta parto. Inter la unua kaj la dua murego estas la reĝaj palacoj kaj tombejoj. Inter la dua kaj la tria situas la restaĵoj de instalaĵo de akvokonduko kaj akvofiltrejo de la urbo.

En la centro de la tria fuorto vidieblas "Zigurat-e-Ĉogazanbil".

Zigurat estas konstruita ŝtuparo en la formo piramida. La grandaj ŝtuparoj kunigas subajn etaĝojn al suprajn. Ĉi preĝejo jam estis 5 etaĝa ĉirkaŭ 50 metrojn alta, sed nun 3 etaĝoj restis kun 25 metrojn da alteco.

Unu el ĝiaj antikvaj miregoj inter tutaj mezopotamiaj Ziguratoj estas, ties etaĝoj kiuj ne situas sur unu la alia, ĉar distingiĝis dum la fosado ke la muro de ĉiu etaĝo sendepende de la muro de alia etaĝo konstruitas kaj la pli malsupra etaĝo altiĝas tute aparte. Tial la etaĝoj ne pezas sur unu la alia.

La ĉefpreĝejo estas unu kvardato kies dimensioj estas 105m. ĝiaj lateroj situas al originalaj ĉefaj direktoj: La suda, la orienta, la okcidenta kaj la norda. La ĉefa pordego estas en la suda parto, kaj titolas reĝa pordego.

En la dua etaĝo ekzistas ĉambroj por preĝi. La dia preĝejo de suzo situas en la 5a etaĝo pro kiu Zigurat konstruiĝis. Kvar brikaj ĉambroj havante pompajn pordetojn naŭmetre altajn enkondukiĝas al kolektoj da maŭzoleoj, tuneloj, arkoj, ŝtuparoj kaj

aliaj ĉambroj. La menciita preĝejo kun riĉa antikveco havas la intresajn mirigajn karakterojn:

1- La muro estas farita el adobo kunmetita per kalko, koto kaj bitumo. Sur la muro ornamigās per emajloj bril-blu-verdaj kolorigitaj.

2- El la plej surprizigaj restaĵoj kaj verkoj de lamanoj estas manuskriptaj epigrafoj. En dek sesopaj ŝtonbenkoj de oferejo, inter ĉiuj 10 vicoj ekzistas 1 vico da brikoj kojnoskribitaj. Sur la skribaj tabeloj ĝis nun jam tradukiĝis la nomo de la reĝo kaj lia celo por konstrui la preĝejon.

3- La nova metodo de akvokonduko kaj filtrado estas la alia intresaĵo. La plej

proksima rivero al Ĉogazanbil estas "Karĥe". La teroj de la regiono superas ĉirkaŭ 60 metrojn je karĥe rivero, tial urbanismaj inĝenieroj novenkonduitis metodon. Ili fosis unu kanalon 50 km longan. Tiu kanalo transportis akvon en filtrejon kaj post sediment filtrado perpreme transis al pli malgranda akvorezervejo el naŭkanaletoj.

Ĉogazanbil la suna preĝejo al ĉiele ankoraŭ staras, pro tio ke kvazaŭ silk-preĝoj estu la kovro de Di-amantoj kaj blankaj flugantoj lernu flugi ĝis la finosupro. Rigardu la sunan preĝejon elkore, tiam Di-radiojn vi vidos en ĝi brilantaj.

*Panoramo de Zigurat-e Ĉogazanbil*

